# La Jues-lago en Herzberg

La Jues-lago, en la centro de Herzberg am Harz, estas ĝis 28,5 m profunda kaj 6,88 ha granda ter-enfaleja lago, kiu estiĝis antaŭ 8000 ĝis 14000 jaroj. Ĝi ebligas multspecajn aktivadojn, ekzemple naĝadon, subakviĝadon kaj fiŝkaptadon.



Ĉe ĝia bordo okazas jam de jaroj la Herzberg-a Jues-lagofesto kun fama paperboata regato. Individuoj kaj teamoj konkursas remante siajn boatojn, kiujn ili mem faris el papero, kartono.





La natur-naĝejo Jues-lago invitas somere al naĝado kaj ripozado.

Por interesitoj valoras vizito de la subakviĝada stacio de la surloka subakviĝantoklubo.

## La legendo pri la Jues-lago:

Tie, kie hodiaŭ troviĝas la Jues-lago en Herzberg, iam staris kastelo. Ĝi estis bela kaj granda, sed pro granda krimego ĝi mergiĝis pro malica pekego.
La mastrino de la palaco estis fiera kaj malkompata grafino. Iam venis malsata kaj laca fremdulo al la kastelo kaj petis tranoktadon kaj iom da manĝaĵo. La grafino ridis pri la fremdulo kaj donigis al li panon, kiu estis ŝmirita per koto.
Pro tio la fremdulo malbenis la kastelon kun ĝiaj arogantaj enloĝantoj kaj alvokis la koleron de la ĉielo al ĉiuj. La malbeno plenumiĝis, la kastelo mergiĝis. Dum certaj tagoj dimanĉenaskitoj kapablas percepti la palacajn konturojn en la profundego de la lago.



Herzberg 1650.

Poste subakviĝisto dufoje grimpis malsupren, kaj ĉiufoje li kunportis aĵojn el la profundo. Sed kiam oni pluan fojon, je oferto de granda profito, postulis de li subakviĝi al la kastelo, li hezitis. Oni pli altigis la profitpromeson, do li finfine deklaris sin preta. Sed li aldonis, ke se li malsukcesos, li ne plu revidos la lumon, ĉar en la profundo oni mortturnos lian kolon. Sango-strio sur la akva surfaco donos signon pri tio, kaj estos necese forlasi la bordon, ĉar estos danĝere por ĉiuj.

(Redaktis: Zsófia Kóródy)